

SCIENCA REVUO de
Internacia Scienca
Asocio Esperantista
BEOGRAD, Jugoslavio

El Vol.28
n-ro 1/2(123/4)
25.04.1977.

EUGEN WÜSTER
(1898-1977)



En Wieselburg (Malsupra Aŭstrio), kie li naskiĝis la 3an (aŭ la 10an?) de oktobro 1898., mortis la 29an de marto 1977 d-ro inĝ. Eugen Wüster, homo de grandaj meritoj ne nur por Esperanto, sed ankaŭ ĉefe por (internacia) lingvonormigo en la tekniko, homo de internacia aŭtoritato.

Eugen Wüster esperantistiĝis jam en knaba aĝo, tuj antaŭ aŭ komence de la unua mondmilito. Liaj unuaj tradukaĵoj en Esperanto aperis jam en 1917. Pri Esperanto kaj ĝia ebla signifo por scienco kaj tekniko li ankaŭ publikigis en la germana lingvo (inter 1921 kaj 1931).

Ĝisfunda kaj fidinda kaj neegalita estas lia vortarista laboro. El lia plumo fontis: "La oficiala radikaro" (1923.) "Maŝinfaka Esperanto-Vortaro" (1923.), "Zamenhof-Radikaro" (1927.), kaj ĉefe la grandega kaj bonega "Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana", de kiu aperis la duono en kvar kajeroj (1923 - 1929) ĉe Ferdinand Hirt und Sohn, Leipzig. Kvankam ĉio estis preta en manuskripto, la aperigon de la dua duono de la vortaro malhelpis la ekonomia krizo de la tridekaj jaroj. Kiom mi scias, la manuskripto - poste ankoraŭ kompletigita - ankoraŭ ekzistas, kaj mia opinie la esperantistoj devus zorgi pri ĝia publikigo antaŭ ol perdiĝos tiu u-

nika kaj nereproduktebla monumento, rezulto de grandega kaj tre zorga laborado, minejo de Zamenhofa lingvuzo.

Tuj antaŭ la dua mondmilito d-ro Wüster helpis min ĉe la kompilado de la Esperanta parto de nederlanda (kvinlingva) vortaro pri lumigoscienco.

D-ro Wüster estis la patro de la "Esperantologio"; li kreis ankaŭ tiun terminon.

Post la dua mondmilito li ĉefe okupiĝis pri internacia lingvonormigo. Komence (t.e. antaŭ la milito) li opiniis ke Esperanto estas taŭga bazo. Poste li konvinkiĝis ke la aŭtonomaj formoj esperantaj tro devias de la nacilingvaj kaj ke por *tiu* funkcio (ne pre ne por la internacilingva funkcio) iu "naturalisma" planlingvo pli taŭgas.

Forlasis nin por ĉiam denove unu el la veraj grandaj inter ni. Kara restu li en nia memoro. Se eble, ni honoru lin kaj pliriĉigu nin per la ankoraŭa eldono de la dua duono de lia nesuperebla Enciklopedia Vortaro (eble kune kun fotografa reprodukto de la jam aperinta parto (ĉ. 650 grandaj paĝoj).

W.P. Roelofs